

Vojaĝo inter la tempoj
Claude Gacond, 162-a radioprelego, 1966.11.16 & 1966.11.19

Cl.- Atentu esperantistoj! Ĉi tie vi aŭdas la Svisan Kurtondan Radiostacion. Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La esperantistoj kontentiĝas ĝenerale pri elementa kono de sia monda lingvo. Parolante kaj korespondante ili uzas la simplajn verbajn tempojn

A.- **as, is, os**

Cl.- kaj sin turnas al la participaj sufiksoj ĉefe por formi adjektivojn kaj substantivojn. Ili ne diras :

A.- *En tiu magazeno Esperanto estas parolata !*

Cl.- sed :

A.- *En tiu magazeno oni parolas esperanton !*

Cl.- Tamen se ili devas skribi ŝildon por tion anonci, tiam ili skribas :

A.- *Esperanto parolata !*

Cl.- Jen tute normala fenomeno. Estas diferenco inter la skribita lingvo kaj la parolata lingvo. Tiun diferencon rimarkas ĉiuj, kiuj provas esperantigi literaturan tekston aŭ esprimi iom precize sian penson. Per esperanta lernolibro ili eble lernis, ke kiam :

A.- *fiŝisto estas **kaptonta** fiŝon, tiam la fiŝo estas **kaptota**.*

Cl.- Ke kiam :

A.- *Fiŝisto estas **kaptanta** fiŝon, tiam la fiŝo estas **kaptata**.*

Cl.- Kaj ke kiam:

A.- *Fiŝisto estas **kaptinta** fiŝon, tiam la fiŝo estas **kaptita**.*

Cl.- Tiu paralelismo ŝajnis al ili mirinda kaj entuziasmiga. Tamen se ili iom rigardas fiŝon dum fiŝkaptado, tiam ili baldaŭ rimarkos, ke kiam:

A.- *Fiŝisto estas **kaptanta** fiŝon, la fiŝo estas jam **kaptita**.*

Cl.- Por tiu besto la kaptado okazis fulmrapide. La fiŝo vidis ion moviĝantan. Ĝi alproksimiĝis. Jen apetitiga vermo, pensis tiu manĝemulo! Kaj hop, **ĝi estis kaptita**.

A.- Tiam, kaj nur tiam, la fiŝisto rimarkas movetojn ĉe la fadeno. Lia vizaĝo ekĝojas, ĉar fine **li estas kaptanta fiŝon**. Kaj li tiras al si la hokon, **kun la kaptita besto**.

Cl.- Zamenhof tre konsciis pri la diferenco ekzistanta inter la aktivaj kaj pasivaj participoj. Ne estas li, kiu imagis tiujn lernolibrajn paralelismojn, sed disĉiploj avidemaj je skemeco.

A.- Zamenhof nur donis kodan gramatikan resumon kun ses verbaj finiĝoj, tri aktivaj participaj sufiksoj kaj tri pasivaj participaj sufiksoj. Kaj poste li uzis ilin.

Cl.- Se tiu kodo sufiĉis al tiuj, kiuj kontentiĝis pri elementa lingvouzo, la tradukistoj tuj renkontis malfacilaĵojn en la uzo de la pasivaj participoj **ata** kaj **ita**. Ili cerbumis :

A.- Ĉu tie mi skribu : la domo estas **konstruita** aŭ la domo estas **konstruata** ?

Cl.- Ĉi mi diru : li estis **akcidentata** aŭ li estas **akcidentita**.

A.- Kaj ili petis al Zamenhof pri verkado de plena gramatiko.

Vojaĝo inter la tempoj
Claude Gacond, 162-a radioprelego, 1966.11.16 & 1966.11.19

Cl.- Sed Zamenhof ne obeis. Li preferis verki kaj lasi la taskon redakti plenan gramatikon al la posteuloj. Tiurilate letero lia estas tre instrua.

A.- Ĝi estas respondo al Karlo Bourlet. Dato: Dudekkvina de aprilo 1902. Aŭdu eron el ĝi:

Cl.- *“Elabori plenan detalan gramatikon estas afero tute ne ebla. La verkado de tia gramatiko postulus grandan serion da jaroj, sed en la rezulto [...] tia gramatiko ne sole ne faciligus la lernadon de la lingvo, sed terure ĝin **malfaciligus** ! Se mi eĉ laborus tutan centon da jaroj kaj publikigus libron enhavantan kelkajn milojn da paĝoj, mi ja neniam povus antaŭvidi teorie ĉiujn dubojn kaj demandojn, kiuj povus aperi ĉe la lernantoj, kaj se mi ian punkton klarigus ne sufiĉe precize, mia klarigo nur **erarigus** la lernanton. Ĉar mi laboris super Esperanto grandan serion da jaroj, tial en mia **propra kapo** la tuta lingvo kun ĉiuj ĝiaj nuancoj havas formon tute **difinitan kaj precizan** ; sed se mi volus ĉiujn eblajn nuancojn **klarigi teorie** mi nur malklarigus la aferon kaj terure ĝin malfaciligus... Laŭ mia opinio estus necese, ne ke mi verku teorian detalan gramatikon, sed ke mi verku kiel eble pli da praktikaj libroj (diversaj literaturaj tradukoj) ; el **tiaj** miaj libroj ĉiu povus lerni la lingvon kun ĝia tuta vera kaj unuforma spirito multe pli bone, pli facile kaj pli precize ol el la plej dika gramatiko... Por la bona disvolviĝo de nia lingvo estus plej necese, ke mi **forĵetu de mi ĉian alian laboron kaj ke mi dediĉu mian tutan tempon nur al tradukado, verkado, verkado kaj tradukado**. Sed ho ve ! tio ĉi estas por mi tute ne ebla !*

A.- En la epilogo al sia ĵus eldonita verko *Vojaĝo inter la tempoj* Kalocsay diras pri tiu sinteno de Zamenhof kaj ĝia rezulto :

CL.- *« por la hodiaŭa esperantistaro en la **zamenhofa verkaro** kuŝas **lingva tradicio**, sen kiu Esperanto estus nur tia sama projekto, kiel la aliaj lingvoprojektoj.*

A.- Zamenhof ne multe babilis pri sia lingvo kiel Louis Couturat por Ido, Edgar von Wahl por Occidental aŭ Alexander Godes por Interlingua. Li uzis ĝin por krei lingvan fundamenton. Povis poste naskiĝi kvereloj pri gramatikaj punktoj inter la esperantistoj, fine tiun gramatikan disputon gajnos la skolo, kiu ne lerte teoriumos, sed kiu eltiros precizigajn regulojn el sistema observado de la zamenhofa lingvouzo.

Cl.- Estas ĉiam danĝere teorie formuli regulojn. Se ni revenas al nia **kaptata fiŝo**, ni konstatas, ke lingvo-profesoro formulis regulon pri paralelismo inter la aktivaj kaj pasivaj participoj, kiu fakte estas fremda al la zamenhofa Esperanto.

A.- El tiu teoriumado naskiĝis gramatika kverelo pri la ekzakta rolo de la participaj sufiksoj **ata** kaj **ita**. Tiu lingva debato instigis sistemajn studojn de la uzo de la pasivaj participoj ĉe Zamenhof, kaj hodiaŭ, dank'al la verko de Kalocsay, kiun ni ĵus menciis : *Vojaĝo inter la tempoj*, ni fine havas pli klaran komprenon pri la spirito de nia gramatiko.

Cl.- Tiu studo ĉefe interesos la verkistojn kaj pedagogojn. Ĝi eble ŝajnas neutila al la esperantisto, kiu kontentiĝas pri elementa kono de sia monda lingvo. Tamen ĝi signifas por Esperantujo grandan paŝon antaŭen.

A.- Vi aŭdis Radio-Svislandon.

Cl.- Claude kaj Andrée Gacond diras al vi : Ĝis reaŭdo !

-oOo-